

Aparta opinio pri la Sekcia raporto « Pri vortordo en Esperanto »

Ĉi tiu dokumento celas pravigi mian voĉdonon kontraŭ la koncerna raporto, aprobita de la Sekcio pri gramatiko. La raporto estas interesa studaĵo, rezulto de laboro bone stirata de la Direktoro, en serioza kaj respektema laboretoso. Bedaŭrindas tamen, ke la alprenita Sekcia regularo uzis tro striktajn kriteriojn por amendoj kaj ilia akcepto, kio ebligis amendi la Direktoran tekston nur margene. Alia afero por bedaŭri estas, ke la laboro disvolviĝis sen certeco pri la destino kaj celpubliko de ĉi tiu teksto. Mia negativa voĉdono esprimiĝis kadre de mia premiso, eble erara, ke la teksto estas destinota de la Akademio al larĝa publiko (i.a. al la instruistoj de nia lingvo), aŭ ke la Akademio iel oficialigos per ĝi iun specon de analizo de la informa strukturo en Esperanto.

La teksto baziĝas sur la ĝusta ideo, ke en Esperanto uzo de pasivaj verbofomoj (*esti* + pasiva participo) aŭ de t.n. *fenditaj frazoj* (*estas...*, *kiu/ke...*) estas fojfoje sentebla kiel stile « peza », kaj ke fojfoje eblas ĝin eviti per specifa aranĝo de la frazpartoj, pri kio denaskaj parolantoj de lingvo kun « rigida vortordo » ne ĉiam konscias, aŭ ne ricevis sufiĉan instruon. Ja la uzo de tiaj specifaj frazstrukturoj servas por ŝanĝi la informan strukturon de la frazoj, kaj en lingvo kun « libera vortordo », kia estas Esperanto, tiajn ŝanĝojn oni parte povas realigi per rimedoj de vortordo, dum oni apenaŭ (aŭ tute ne) povas en lingvoj kun « rigida vortordo ».

La kunaŭtoroj de la teksto opiniis utile doni teoriant aliron al la afero, kaj elektis unu el la pluraj ekzistantaj teorioj pri pragmatiko, ankoraŭ debatataj de la koncernaj fakuloj, ĉar ili baziĝas sur psikologiaj reagoj dum parolago, kies formaligo kaj universaleco estas necertaj. Mi proponis al la Sekcianoj uzon de iom alispeca konata teorio, kiun mi trovis pli oportuna, ĉar funkcianta per nocioj facile klarigeblaj al laika publiko (*temo* : tio, pri kio oni diras ion ; *komento* : tio, kion oni diras pri la temo ; *emfazo* : tio, kion la parolanto opinias grava por atenti en lia komunikaĵo). Cetere la du aksoj *temo-komento*, unuflanke, kaj *emfazo*, aliflanke, bone kongruas kun la du koncernaj « pezaj » frazstrukturoj : pasivo servas por igi objekton temo (dum kutime tiun funkcion plenumas la subjekto), kaj *fenditaj frazoj* (nomataj *emfazaj frazturnoj* en PMEG, §33.4.1.1 kaj 33.4.1.2) por meti emfazon sur iun « elfenditan » frazparton. Mi prezentis ankaŭ zorgojn pri tio, ke la difino en la teksto de la termino *remao* laŭ mi ne ebligas al la leganto mem trovi en pluraj el la interesaj ekzemplaj frazoj, kio estas remao kaj kio ne estas. La kunaŭtoroj tamen konsideris, ke la teksto bezonas modifon nek de la alprenita teoria aliro, nek de la difino de ties nocioj.

Aldone al la supraj ĝeneralaj rezervoj mi menciis jenajn problemajn punktojn.

- La unua paragrafo skize prezentas la nociojn *temo* kaj *remao*, sed faras tion per uzo de la ideoj de « konata » kaj « nova », kio riskas erarigi laikan leganton pri tio, ke en la frazo *Iu knabo legas la libron* la temo estus la konata *la libron*, ĉar kun difina artikolo, dum *iu knabo* estus remaa, ĉar nova informo. La sama paragrafo povas ankaŭ doni la malĝustan impreson pri sinonimeco de la diversaj menciitaj terminoj, kiuj fakte apartenas al diversaj teorioj.
- La teksto ne mencias ekziston en Esperanto de la nemarkita vortordo : subjekto, verbo, diversaj propozicinivelaj komplementoj (predikativo, objekto, adjekto). Ja tiu ofte prisilentata regulo montriĝas utila, kiam la sintaksaj funkcioj estas nek morfologie markitaj, nek unuavide retroveblaj per semantiko (*Leono estas besto* ; *Sia estas kara pli ol la najbara* ; *Malpli da laboristoj implicas maltra da laboro*). Kompreneble tiu ĉi nemarkita vortordo ne estas « rigida » kaj devio disde ĝi, kiam semantiko aŭ morfologio

sufiĉas por indiki la sintaksajn funkciojn, servas por diversaj celoj (informstrukturaj, sed ankaŭ stilaj, poetikaj...).

- Male al tio, kion asertas la teksto, fenditaj frazoj ekzistis en klasika Esperanto (*Estas mi, kiu faris konspiron kontraŭ mia sinjoro^Z*), kvankam ili neniam tre vaste enuziĝis, krom sub la plumo de iuj aŭtoroj, ekz-e Valienne (*Ne estas en la preĝejon, ke vi metis la etulon*). Mi kolektis kelkajn diverstipajn fenditajn frazojn en la *Tekstaro de Esperanto* kaj proponis al la Sekcianoj, ke oni provu « plibonigi » ilin per la rimedoj de vortordo : malmultaj montriĝis facile transformeblaj, malgraŭ ke la Sekcia teksto asertas, ke ilia « signifo en lingvo liberorda esprimeblas per simpla propozicio ».

Eĉ en la okazo de la subaj ekzemploj, pri kiuj klaras, ke la fendita frazo de (28) celas esprimi la samon kiel (##), sed kun emfazo sur *ŝia filo* (ne iu alia), ne estas vero, ke la plibonigo (26) prezentas nur diferencon de emfazo disde (##) : ĝi ja ankaŭ donas la funkcion de temo al *la fenestron*, kiun funkcion en (##) plenumas *ŝia filo*. Oni krome povus demandi sin, en kio konsistas la eventuala informstruktura nuanco inter (26) kaj (26^{bis}).

- (##) *Ŝia filo rompis la fenestron.*
- (26) *La fenestron rompis ŝia filo.*
- (26^{bis}) *Rompis la fenestron ŝia filo.*
- (28) *Estas ŝia filo, kiu rompis la fenestron.*

Entute la teksto aprobita de la Sekcio neniel hontigos la Akademion, se ĝi publikigos ĝin. Espereble mi tamen supre montris, ke povas resti ĉe oni duboj pri kelkaj alprenitaj starpunktoj en ĝi kaj pri la uzo, kiu plej konvenas por ĝi, pro kio mi opiniis necese, per jena Aparta opinio, klarigi mian negativan voĉdonon al la kolegoj, kiuj ne ĉeestis la Sekcian diskuton.

Marc Bavant